



Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI: 5-a de Aprilo 2016

Ĉeestantoj: Amri Wandel, Jehoŝua Tilleman, Dror Gaon, Ŝlomo Ŝaĥar, Miĥal Amir, Gabi Zeevi. Gasto: Lea Kudevitzki.

Protokolo de la antaŭa kunsido (9-an de februaro 2016) – ĉu estas rimarkoj?

1. Nova klubejo

a) Jehoŝua: hodiaŭ devus esti (kune kun Lea) renkontiĝo kun Jair Efrati, domĉefo de WIZO. Detaloj: 234 NIS por unu kunveno, t.e. 936 NIS monate, (anstataŭ 675 NIS en Bikurej Haitim - sen asekuro), en klasĉambro, lunde, inter 18:00-19:30. La salono (por ZV, LK) kostos 500 NIS. Se ni ne kunvenos – ne pagos. La publika transporto tien estas bona, la parkeblecoj ankoraŭ ne klaraj. *ELI dankas al la serĉkomitato – Lea kaj Joela!*

Voĉdono: ni translokiĝu jam en majo! - *unanime akceptata*.

[Grava posta ĝisdatigo: evidentiĝis ke la salono kostos ne 500 sed mil NIS ĉiufoje. Pro tio estis rete decidite prokrasti la translokiĝon ĝis post la somera LK, al julio.]

b) Pago al Bikurej Haitim: Ariela petis pagi – ni pagis por 4 monatoj (po 675 NIS) kaj ignoris la asekuron, pri kio ili ankoraŭ ne respondis.

2. Dratverejo kaj oficejo (Jehoŝua, Amri)

a) Serĉo de nova luanto: Eran ne havas tempon, rekomendas dungi makleranton. Ĉu indas? (kvankam li prenos unumonatan makleraĵon de la luanto, - sed li laboros pli efike ol ni).

b) La filino de Gabi (aŭ Gabi mem) anoncos en Jad2, kun la hejma telefono de Jehoŝua, por 2800 NIS.

c) La oficejo en Tel Avivo – Amri rekontaktis: la malmultekosta oferto evidentiĝis misgvida, en Petaĥ Tikva. La plej malaltkosta taŭga oficejo en Tel Avivo kostas ĉ. 600 mil siklojn. Gabi vidis ie en la centro de TA reklamon por novaj oficejoj po 7000 miloj por unu kv.metroj, provos trovi la lokon.

3. Financoj (Ŝlomo)

a) La saldo estas 17000 NIS. Ĉiu estrarano povos deklari pri la monataj vojaĝkostoj por ELI, ekde majo. Voĉdono: *unanime akceptita*. Ŝlomo verkos la formularon.

b) Subvencio ELI por la KD de Ŝoŝia kaj Amir: la kosto estos ĉ. 8000 sikloj. Ŝoŝia jam komencis registri, produktos 100 ekz., ELI pagos 2000, la restaĵon pagos ŝi (Ŝlomo pagos rekte al la produktisto). La unuaj enspezoj servos por repagi la subvencion de ELI, poste la enspezoj kovros la investon de Ŝoŝia. Pri la vendado ni formulos kontrakton kun ŝi.

2/...



4. Estraraj taskoj

a) Komitatano C: Eran kandidatiĝis, Amri skribis apogleteron por li.

Respondis la publikan alvokon de Amri al la membraro por la diversaj taskoj:

b) Respondeculo pri kontakto kun membroj: Lusi proponis sin (ŝi ne pagas kotizon).

c) Respondeculo pri sendado de Israela Esperantisto: Jagil proponis sin (li pagis kotizon por 2016 per ĉeko).

ĉ) Redaktoro de IE: ankoraŭ vakas.

d) Kotizo-memoriganto/kolektanto (ne nepre devas esti la kasisto!). - Jehoŝua faras tion al la UEA-anoj, kune kun la ELI-kotizo – sed ne ĉiuj estas UEA-anoj. Amri faris tion lige kun la dissendado de IE. Sed la ĝenerala posteno ankoraŭ vakas.

5. La 17-a Israela Kongreso (Amri)

a) Ĉambroj kaj partoprenantoj: 12 ĉambroj en la hotelo, 7 eksterlandanoj (lastmomente aliĝis paro el Hispanujo). Amri kompilis aliĝ- kaj ĉambro-liston kaj rezervis ĉambrojn por ekstraj tranoktoj petitaj de la eksterlandanoj. Entute ĉ. 55 aliĝintoj!

b) Manĝo-mendoj: ĵaŭde vespere (restoracio Jonas apud Blumfield, Nava mendis, ELI subvencios), vendrede tagmeze (falaflo en la Placo Horloĝo), vendrede vespere (en la hotelo – devas mendi ĝis 1.4), kaj sabate tagmeze (restoracio en la haveno?). Malmultaj kontaktis Jael kiu ordigis la manĝo-liston. En la solena vendreda vespero en la hotelo estos ĉ. 20 homoj aldone al tiuj kiuj tranoktas en la hotelo (laŭ enketo inter la homoj kiuj ne respondis al Jael).

c) Programo: Amri dissendis detalan programon al ELI-listo.

ĉ) Ekskursoj: AK – 12-14/4, Nelly + Spinola (2), Jehoŝua mendis en Port Inn. PK – 17-21/4, 6 homoj: Nelly, Spinola (2), Kajto (2), Sossois. Amri rezervis en Masada, Eilat kaj Jordanio. Problemo de la veturigo – solviĝas per la helpo de Nava kaj Eran.

d) Materialoj: Kongresa Broŝuro - Amri preparos; nomŝildoj kaj afiŝo (Rollup) - Jael preparos la grafikon, Amri prizorgos la printadon.

6. Baza E-kurso – Tro malfrue por tiu-ĉi jaro. Eble ni organizos en la nova loko por la venonta lernoĵaro.



7. Retejo de ELI

- a) Dror volas replani la tuton, sed li havas nun tro multe da laboro, kaj mankas la tempo.
- b) La materialo de UK 2000 en TA estis sur la internacia E-servilo esperanto.org, kaj grandparte perdiĝis kiam tiu kolapsis. Amri kontaktis la mastrumanton (Trio) kiu sukcesis trovi nur malmulton kaj sen la fotoj. Ni ĉiuj klopodu trovi persone, kio restis ĉe la anoj.
- c) Dror devas kontroli nian poŝtkeston de tempo al tempo.

La venonta kunsido: marde, la 3-an de majo 2016, je 19:30 (*en la malnova loko!*)

Protokolis: Gabi Zeevi